Vasilij Devjatnin,

# Sciuro kaj papago

Sciuro malgranda kuradis en rado
Kaj homojn amuzis per sia kurado.
Kaj jen al papago ĝi diris fiere :
“Mi vin, mizerulo, bedaŭras sincere :
Kun kora doloro eterne mi vidas,
Ke tute senmove sur ringo vi sidas!
Rigardu : jen ĉiam mi kuras pli alte
Kaj tial je vivo kontentas senhalte . . .”
Papago rigardis sciuron kun moko
Kaj diris : “kurado rapida kaj lerta,
Sed bone kurante, sur unu nur loko
Vi restas, mizera besteto nesperta.”

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1043-2118 (2014-06-05 09:36:04)*

*Tiu poemo troviĝas en la Fundamento Krestomatio, en* http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta_Krestomatio/Sciuro_kaj_papago .